


Kara JES-partoprenanto,

ĉi-tiu dokumento helpu vin orientiĝi iomete en la sufiĉe komplika kaj vasta ĉi-jara JESejo.


1. La JESejo havas la alojn A, B, C, D, E, F, G kaj H. Ĉiu ĉambro estas nomita laŭ la alo kaj la etaĝo. Ekzemple ĉambroj en alo D en la 2a etaĝo komenciĝas per D2, kaj tiel plu.
2. Estas entute 5 etaĝoj, de la teretaĝo ĝis la 4a etaĝo, sed nur alo H havas la 4an etaĝon. La aliaj estas malpli altaj.
3. Estas tri ĉefaj ŝtuparejoj en la domo kiuj konektas ĉiujn etaĝojn. (La aliaj konektas nur kelkajn etaĝojn.) Ni nomis ilin la *hamakan* ŝtuparejon, la *jesuan* ŝtuparejon kaj la *miskalkulitan* ŝtuparejon.
4. Se vi vidas klakeblan numeron en la mapo, vi povas sekvi la ligilon al foto kiu montras la lokon de la respektiva numero. Ĉefe estas fotoj de koridoroj por ke vi ne perdiĝu.
5. Ni ne garantiigas ke la mapo estas centelcente ĝusta.
6. La etaĝoj estas iom konfuzaj ĉar estas multaj ŝtuparetoj kaj duonetaĝoj kiuj estas meze inter du etaĝoj. La mapo reprezentas la etaĝojn laŭ la oficialaj nomoj de la ejo, sed en la realeco la alteco de iu ĉambro ne necese kongruas kun la logiko de la mapo. Povas okazi ke iu ĉambro estas oficiale en la 2a etaĝo sed fakte troviĝas pli proksime al ĉambroj en la 3a etaĝo ol al aliaj ĉambroj en la 2a etaĝo. Se vi ne trovas iun ĉambron, provu la saman lokon sed unu etaĝon pli alte aŭ pli malalte.


teretaĝo
programĉambro
akceptejo
ŝtuparo
necesejo/duŝo
kuirejo
manĝejo
dormĉambro
amasloĝejo
rezervita spaco
A, B, C ktp = alo de la konstruaĵo
Salono Nesto (trinkejo)
por memzorgantoj
D001
D
Rovera Salono
hamaka
7
8
13
14
15
16
saŭna salono
saŭno
10
11
12
A
B
5
C
6
jesua
E
E001
E004
Lupida Salono
Esplorista Salono
G
2
3
4
G002
F
miskal-
kulita
H
lifto
F001
9
Salono Renato
1


programĉambro
akceptejo
ŝtuparo
necesejo/duŝo
kuirejo
manĝejo
dormĉambro
amasloĝejo
rezervita spaco
A, B, C ktp = alo de la konstruaĵo
B
C101
C102
C
17
18
D
A
C105
C103
E
G
20
H
19
F
lifto
F101
F102
Salono Ĉokoladaj Bananoj
1a etaĝo




Salono *La Svarmo* (gufujo)
Salono *La Ĉangalo* (koncertejo)
provludejo
B202
D201
D202
D
B
C201-205
C
C206-210
A
24
21
22
23
E201-228
E
L201-203
E229-255
G
ne trairebla
H
F
lifto
programĉambro
akceptejo
ŝtuparo
necesejo/duŝo
kuirejo
manĝejo
dormĉambro
amasloĝejo
rezervita spaco
A, B, C ktp = alo de la konstruaĵo
2a etaĝo



programĉambro
akceptejo
ŝtuparo
necesejo/duŝo
kuirejo
manĝejo
dormĉambro
amasloĝejo
rezervita spaco
A, B, C ktp = alo de la konstruaĵo
D302-310
D311-320
D
G302-309
C301-305
C
25
26
G
C306-310
E301-327
E
E328-350
27
28
29
H
H304
F
lifto
3a etaĝo

# 4a etaĝo




- programĉambro
- akceptejo
- ŝtuparo
- necesejo/duŝo
- kuirejo
- manĝejo
- dormĉambro
- amasloĝejo
- rezervita spaco


A, B, C ktp = alo de la konstruaĵo




[1] Aliro al la korto. Ne trairu per aŭto sed provizoje parku ekstere, akceptiĝu kaj parku sur la JES-parkejo (vidu 15).



[2] Ĉefenirejo al la domo. Trairu la lignan pordon kaj iru maldekstren por trovi la akceptejon.



[3] Enirejo al la akceptejo maldekstre.



[4] “Monaĥeja” koridoro G0. La malferma pordo dekstre gvidas al la akceptejo.



[5] Jesua (vi vidas kial) ŝtuparejo inter la aloj A, B, C kaj G en la teretaĝo.



[6] Koridoro C0 kiu gvidas de la hamaka ŝtuparejo al la jesua ŝtuparejo. Ĉi-tie estas la koverta poŝto.



[7] Enirejo al la salono *Nesto* (alo D). Ĝi estas plejeble malalta, ĉe la malsupro de la hamaka ŝtuparo.



[8] Hamaka ŝtuparejo en la teretaĝo, duonetaĝon super la enirejo al la salono *Nesto*. La pordo en la fono gvidas al la koridoro E0 kun la Lupida Salono kaj la Esplorista Salono.



[9] Salono *Renato*. Tra la fenestro oni vidas la eksteran ŝtuparon kiu gvidas al la salono *Ĉokoladaj Bananoj*.



[10] Saŭna salono (plej maldekstra pordo).



[11] Necesejoj en alo A, survoje al la saŭno.



[12] Trairejo preter alo A kiu gvidas de la saŭno kaj la necesejoj al la jesua ŝtuparejo.



[13] La salono *Nesto* de ekstere. Por eniri ĉirkaŭu la konstruaĵon maldekstre.



[14] Strato kiu gvidas al parkejo. Traveturu inter la du kolonoj maldekstre.



[15] La JES-parkejo. La pordo je la dekstra flanko gvidas al la hamaka ŝtuparejo.



[16] La alia flanko de la parkejo.



[17] Koridoro en C1 kun amasloĝejoj por festemuloj, el la vidpunkto de la hamaka ŝtuparejo.



[18] Jesua ŝtuparejo en la unua etaĝo, venante de la amasloĝejoj en C1. Koridoro al G1 kaj al la salono *Ĉokoladaj Bananoj* maldekstre.



[19] Miskalkulita ŝtuparo de la teretaĝo al la unua etaĝo en alo F, suprenirante de salono *Renato* kaj de la akceptejo. La pordo estas la enirejo al la Salono *Ĉokoladaj Bananoj*. La koridoro je la dekstra flanko gvidas al G1.



[20] Koridoro G1 kiu gvidas de la miskalkulita ŝtuparejo (kaj de la salono *Ĉokoladaj Bananoj*) la jesua ŝtuparejo (kaj plu al la amasloĝejoj en C1).




[21] Enirejo al la salono *La Ĝangalo* en la 2a etaĝo, venante de la 1a etaĝo per la hamaka ŝtuparo.




[22] La hamaka ŝtuparejo en la 2a etaĝo. Duonetaĝon malsupre oni videtas la enirejon al la salono *La Ĝangalo*. La granda pordo en la fono maldekstre gvidas al la dormĉambroj en C2 kaj al la salono *La Svarmo*. La ŝtuparo supren gvidas al la dormĉambroj en C3, D3 kaj E3.





[23] Koridoro E2 kun dormĉambroj el la vidpunkto de la hamaka ŝtuparejo.



[24] La dua etaĝo en la jesua ŝtuparejo. Maldekstre la enirejo al la salono *La Svarmo*. En la fono la enirejo al la koridoro C2 kun dormĉambroj (trairejo al la salono *La Ĝangalo*).




[25] Jesua ŝtuparejo en la 3a etaĝo. La pordo en la fono gvidas al la dormĉambroj en G3.



[26] Koridoro C3 kun dormĉambroj vidita de la jesua ŝtuparejo. Ĝi gvidas al la hamaka ŝtuparo, D3 kaj E3.




[27] Koridoro G3 kun dormĉambroj el la vidpunkto de la miskalkulita ŝtuparejo.





[28] Miskalkulita ŝtuparejo en la 3a etaĝo. La pordo antaŭe gvidas al la dormĉambroj en G3. La enirejo al H4 estas tute apude je la sama nivelo kvankam ĝi estas oficiale en alia etaĝo.




[29] Eniro al H3 de la miskalkulita ŝtuparejo. La malfermita pordo en la koridoro estas la aliro al la trankvila amasloĝejo.



[30] Vidpunkto de la miskalkulita ŝtuparejo. Por atingi la koridoron H4 iru tra la verda pordo kaj tuj iru maldekstren tra la ruĝa pordo kaj povas tiel magie ŝanĝi etaĝon sen moviĝi vertikale.



[31] Koridoro H4 kun dormĉambroj. Preter la angulo la koridoro daŭriĝas kaj je la fino estas la amorejo.